

La pola kulturo en la tempo de Ludoviko Zamenhof,  
prilumita de la fenomeno de akceptado de  
*Sinjoro Tadeo* de Adam Mickiewicz

Bogusław DOPART kaj Sabina BOBRAN

Tradukita el la pola de Maria MAJERCZAK

Enhavo

Klarigo pri la origino de la teksto	60
La multnivela identeco de Ludoviko Zamenhof	60
La loko kaj la historia kadro de la vivo de L. Zamenhof	64
La socia rolo de <i>Sinjoro Tadeo</i> de Adam Mickiewicz en tiu tempo	65
La rolo de la verko por la pola kaj esperanta kulturoj	66
Bibliografio	67

**Resumo.** La celo de la artikolo estas livero de ŝlosiloj al la multnivela identeco de la kreinto de esperanto, humanisto el la mezorienta parto de Eŭropo. La biografio faras Ludovikon Zamenhof heredanto de la tradicio de la juda diasporo en Pollando, sed ankaŭ de la tradicio de la pola intelektularo, formita per la naciaj ideoj kaj la eŭropa universalismo, per la romantikisma simbolaro kaj la pozitivisma penso. La naskiĝloko de L. Zamenhof situas sur la mapo de la Pola Respubliko, longdaŭra unio de nacioj en Eŭropo (1569–1795), sur teritorio restanta sub kulturaj influoj rusaj kaj germanaj. Lia naskiĝtempo situas en la periodo de manko de sendependeco de la Respubliko (1795–1918), kaj lia infanaĝo dum kaj post la lasta nacia insurekcio, la januara (1863–1864). La pola kulturo tiam alproprigas al si la grandan heredaĵon de romantikismo, kaj en kontakto kun la eŭropaj scienco, filozofio, literaturo ĝi servas transformiĝon de la komunumo de poloj en demokratan kaj modernan nacion. En tiu procezo gravan rolon ludas la tiutempa ekscitoplena transprenado de la enhavo de *Sinjoro Tadeo* de Adam Mickiewicz, la nacia epopeo (esperantigita de Antoni Grabowski).

**Streszczenie.** Referat „Kultura polska w czasach Ludwika Zamenhofa” ma na celu dostarczenie kluczy do wielopłaszczyznowej tożsamości twórcy esperanta, humanisty z Europy środkowo-wschodniej. Biografia Zamenhofa czyni go spadkobiercą tradycji diaspory żydowskiej w Polsce, ale też polskiej inteligencji, ukształtowanej przez idee narodowe i uniwersalizm europejski, przez symbolikę romantyzmu i myśl pozytywistyczną. Jego miejsce urodzenia mieści się na mapie Rzeczypospolitej Polskiej, pierwszej długotrwałej unii

narodów w Europie (1569–1795), na terenie wpływów kulturalnych rosyjskich i niemieckich. Czas urodzenia należy do okresu utraty niepodległości przez Rzeczpospolitą (1795–1918), dzieciństwo upływa podczas ostatniego powstania narodowego (powstania styczniowego) i po nim. Kultura polska przyswaja wówczas wielkie dziedzictwo romantyzmu i w kontakcie z europejską nauką, filozofią, literaturą służy przemianom zbiorowości Polaków w naród demokratyczny i nowoczesny. Ważną rolę odgrywa w tym burzliwa recepcja *Pana Tadeusza* i mickiewiczowski wzorzec twórcy i wieszczka.

### Klarigo pri la origino de la teksto

Ĉi tiu studo pri L. Zamenhof estis farita en la Fakultato de Pola Filologio de la Jagelona Universitato en Krakovo. Per ĝi la universitato dankas nome de krakovanoj al la ILEI-anoj, kiuj donacis al la urbo valoran lingvoprezentan programon kiel gravan parton de la unua krakova *Nokto de Lingvoj* la 24-an de julio 2009. Per la studo, farita en la jaro de la 150-a naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof, la Katedro de la Pola Literaturo de Klerismo kaj Romantikismo de la Instituto de Pola Filologio ankaŭ oficiale aliĝis al festado de la Jubileo.

### La multnivela identeco de Ludoviko Zamenhof

La biografio de Ludoviko Zamenhof, difinita per lia historia spertaro, estas historio de la vivo de orienteŭropano loĝanta sur la teritorio de la eksa Respubliko de la Du Nacioj en la tempo kiam la modernaj naciaj ideoj estas nur formiĝantaj. Same kiel la vivo de la postaj, dudekjarcentaj heredantoj de la tipa por tiu teritorio multvoĉa eŭropeco, Miłosz- aŭ Czapski-familioj, ankaŭ tiu de Zamenhofoj respegulas la procezon de ŝanĝoj, kiujn — citante Adam Zagajewski (2004:6) — oni povus nomi “historio de malrapida transiro [...] de libera eŭropa ekzistado [...] al patriota sinteno”, de la universalisma identiĝo al nacia identeco. Revo de la juna Ludoviko Zamenhof — ido de instruistoj de fremdaj lingvoj, edukita en dulingveco de ruslingva kaj jidlingva juda familio — estis famiĝo en la kampo de la rusa literaturo. Post la spertoj de la brutala kontraŭsemideco de la nigra sotnja<sup>1</sup> li ŝanĝis la preferon kaj komencis uzi la polan lingvon. Tiu poste fariĝos la gepatra lingvo de liaj infanoj, jam modernaj patriotoj kiel la gefratoj Czapski, kiuj sian servadon al la elektita nacia kulturo situigis en la kunteksto de rafinita eŭropeco. Funde instruitaj en medicinaj universitatoj, majstrantaj lingvojn, ili mortos en la periodo de pereigado de la pola intelektularo dum la dua mondmilito: Zofia kaj Lidia Zamenhof estos gasmortigitaj en Treblinka (52°38' N, 22°03' Or),

<sup>1</sup>Ruslingve сотня чёрная, laŭvorte ‘cento nigra’, politika partio en Rusio.

Adam estos pafmortigita en Palmiry (52°22' N, 20°47' Or) dum la hitlerana kampanjo AB.<sup>2</sup>

La multtavola identeco de la estonta doktoro Zamenhof, en kiu surmetiĝas la tradicioj juda, pola kaj rusa, formiĝadis en urbo-kaldrono, urbo multetna kaj multlingva. En Bjalistoko, estanta dum la infanaĝo de Ludoviko (tiam Leyzer) Zamenhof parto de la Rusa Imperio, loĝis judoj,<sup>3</sup> poloj, germanoj, rusoj kaj ekde 1859 al la urbaj someraj foiroj regule venadis blankrutenoj kaj ciganoj. Ne malofte en la pola kulturo okazis ke ĝuste en tiuj kaldronoj, dissemataj sur la teritorio de la eksa Litova Princlando, naskiĝis kaj aktivis elstaraj reprezentantoj de la pola intelektularo. Nur en la dua duono de la 19-a jarcento en la provinca Grodno, kie la destino lokos ankaŭ Zamenhof, aktivis unu el la plej talentaj verkistinoj de la postjanuara<sup>4</sup> generacio, Eliza Orzeszko (1841–1910). Ie en belorusa vilaĝo Dorohowica<sup>5</sup> la plej grandajn eŭropajn poetojn tradukis Zofia Trzszczkowska (1847–1911), konata sub la pseŭdonimo Adam M-ski. Tiu virino, havanta genian senton de la literatura moderneco, transdonis al la idaro sian bildon en foto montranta ŝin en tradicia kamparana vesto. Jen ekzemplo kiel forte la sinteno konsistanta en kunigo de elementoj eŭropaj, universalaj, kun la propraj, lokaj, estis en la idearo de ĉi tiu intelektularo evidentaĵo. En la periodo de la mallibero<sup>6</sup> eŭropeco estis perspektivo universala kaj hereda, dum ideologia, politika naciismo montriĝis tre malfrua fenomeno (la unua naciisma partio sur la pola teritorio estis fondita en 1893). Tio ne signifas ke en la tempo de Zamenhof la vivo en Pollando estis idilio. La administraj kaj policaĵaj instancoj de la invadintaj landoj realigadis sur la tereno de la eksa Respubliko perfortan ekspoligadon, kaj samtempe pezis ĝia propra kasta heredaĵo generanta fanatikan diskriminadon videblan en la problemaro de la tiutempa beletro (ekzemple la motivo de mezalianco en, unuavice, la romano *Lalka* 'La pupo' (1890) de Bolesław Prus (1847–1912)).

La Respubliko de la Du Nacioj (1569–1795) — longdaŭra unio de nacioj en Centra-Orienta Eŭropo ekestis kiel sintezo de tri politikaj nacioj: poloj,

<sup>2</sup>Germanlingva mallongigo de *Außerordentliche Befriedungsaktion* 'eksterordinara operacio de pacigo', *AB-Aktion*. Temas pri nazia kampanjo dum la dua mondmilito cele al elimino de intelektuloj kaj superaj klasoj de la pola popolo ekde 1940.

<sup>3</sup>Laŭ Электронная еврейская энциклопедия loĝis en Бѣлостокъ (Bělostok'), la tiama ruslingva nomo de la urbo en 1861 11 873 judoj (69,8% de la tuta loĝantaro) kaj en 1895 47 783 judoj (76,0%). Laŭ Maimon (1978:19) loĝis en la urbo en 1860 16 544 personoj, inter ili 11 288 judoj (68,2%). Statistikaj donitaĵoj kelkfoje klasas laŭ religio, kelkfoje laŭ preferata lingvo (judo disde jidparolanto).

<sup>4</sup>Mencioj pri januaro referencas al la pola nacia kontraŭcara insurekcio, komenciĝinta en januaro 1863 kaj daŭrinta ĝis 1864.

<sup>5</sup>Nun nomita Дарагавица en la belorusa lingvo kaj troviĝanta en Belorusio en la regiono de Капыль.

<sup>6</sup>La periodo de senŝtata ekzisto de la pola nacio, 1795–1918.

litovoj kaj rutenoj. Ene de ĝi la nocio *pola nacio* signifis “pli la civitanecon kaj civilizon ol apartenon al difinita etna grupo” (Snyder 2006:15). La Respublikon trapasadis grandaj religiaj limoj inter kristanismo orienta kaj okcidenta. Ankaŭ ĉi tie troviĝis la plej granda en Eŭropo juda medio, kies membroj dum jarcentoj ĝuis plenan liberon, kvankam neniam ili ĉesis sekvi la dialektikon ni—la aliaj. Ilia kontribuo al disvolvado de la kultura kaj ekonomia vivo estis granda. Similan rolon ludis armenoj, tataroj kaj protestantoj enmigrintaj el Nederlando kaj la Britaj Insuloj. La multnacieco dum jarcentoj difinadis la vivon en grandega parto de la teritorio de la Litova Princlando kaj la Kronlando. En la 20-a jarcento en tiu teritorio formiĝis kvin landoj: Pollando, Litovio, Belorusio, Ukrainio kaj Latvio.

Kiam la dispartigo de Pollando kaj okupo de ties teritorio fare de Rusio, Prusio kaj Aŭstrio kaŭzis la finon de la pola-litova Respubliko (1795), la pola intelektularo identigis sin kun la libereca idearo kaj transiris al nacia pensado. De tiuj jaroj restis kompreno de la kulturo kiel baza faktoro de la konservado de la nacia ekzisto, aliro fruktanta per kultureca traktado de la nacio, vaste reprezentata en la humanaj sciencoj, en Pollando. En la cirkonstancoj de mallibero la nacia partikularismo kaj la eŭropa universalismo, t.e. la universalaj eŭropaj valoroj, kiujn favoris la kristana kultura bazo, estis nedisigeblaj.

Dum la 123 jaroj de la mallibero (1795–1918) la pola kulturo disvolviĝadis tre intense ne nur eksterlande, en la medioj de elmigrintoj, sed ankaŭ sur la pola teritorio, administrata de la invadintaj landoj. La tri epokoj: romantikismo, pozitivismo kaj modernismo, alportis al la kanono de la pola kulturo neforpaseblajn valorojn. Sur tiu teritorio, en la kelknacia medio de Bjalistoko kaj poste, de la aĝo de 14 jaroj, en la pola medio de Varsovio, vivis kaj laboris L. Zamenhof. Lia restado en Varsovio disvolviĝis de 1873 ĝis lia morto en 1917, escepte de periodoj de komenco de la medicinaj studoj 1879–1881; kelkmonata medicina praktikado 1885–1886; aliloka laboro 1889–1890 kaj 1893–1897 (Enciklopedio de Esperanto 1979).

Vidata en la historia kunteksto de la pola kulturo, Zamenhof kiel la kreinto de esperanto estas, interalie, heredanto de la eŭropa-universalisma idearo de la intelektularo kaj de la tradicioj de la Respubliko de la Du Nacioj (kio aparte reflektiĝis en la traduko de *Pan Tadeusz*, kiun li sekvis). La komence senliteratura lingvo fervore konstruadis sian beletran bazon, ĉerpante plenmane ne el alia, sed eŭropa, en konsiderinda parto slava, romantikisma literaturo, kiu jam estis sukcesinta klasikiĝi.

La unua verko esperantigita kaj eldonita estis *La neĝa blovado* de Aleksandr Puŝkin (1799–1837), tradukaĵo de Antoni Grabowski (1857–1921), la esperantigonto de *Pan Tadeusz*. Bazita sur internacia leksiko, esperanto estis intencita kiel lingvo publika, “ne trudanta sin al la hejma vivo” (Wiśniewski 1987:59), ne detruanta la ekzistantajn lingvojn aŭ dialektojn. Kiel servanto al la granda universala ideo de kunfratiĝo de la homaro, kiu gajnigis al ĝi

simpatiantojn i.a. inter la sinsekvaj papoj, la lingvo dankas sian genezon al la juda knabo kaj lia bjalistoka infaneco. Zamenhof multfoje emfazis siajn fortajn ligojn kun sia naskiĝloko, kun sia regiona “malgranda patrujo”, ĝin indikante kiel la centron de sia biografio, montrantan la direkton de lia universaleca serĉado. En leteroj al Alfred Michaux (1859–1937) li prezentas Bjalistokon kiel ŝlosilon al la esperanta ideo: “Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj” kaj “La ideo, al kies efektivigo mi dediĉis tutan mian vivon, aperis ĉe mi [...] en la plej frua infaneco” (Wiśniewski 1987:15 k.a.).

Doktoro Esperanto estas, do, enkarniĝo de sentemo de juda infano, grandiganta en kontaktpunkto de diversaj religioj kaj tradicioj, en la multvoĉeco de la lingvoj de Bjalistoko, atestanto de konfliktoj ekestantaj sur kultura kaj etna bazo. La observaĵoj pri partikularaj disputoj atingadis la bazan infanan idealismon, ricevitan de la klera patro kaj la loka juda lernejo: “Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj [...]” (Wiśniewski 1987:15).

Kun uzo de la ĉefmotivo de lia biografia legendo, kies komenco troviĝas en la ruinoj de la Babel-turo, rimarkitaj iun tagon sur la bjalistoka merkato kaj priskribitaj en infana dramo, esperanto estis funkcionanta kiel “l’arkeo de l’alianco” favoranta interkompreniĝon kaj kunlaboron malgraŭ la dividoj. La konkordiga valoro de la inventaĵo, kun ĝia kunteksto de la orienteŭropa heredaĵo, en kiu la Mickjeviĉa tradicio ludis gravegan rolon, ligas la ideon de universala lingvo kun la ĉefideo de la ĉefpoemo de Adam Mickiewicz (1798–1855), esperantigita dum la granda milito fare de la ambasadoro de la esperanta ideo kaj amiko de Zamenhof, Antoni Grabowski.

Pro granda zorgo pri preciza transdono de la senco de la epopeo la du majstroj de esperanto faris decidon pri enkonduko en la Invokacio (komenca parto de la verko) de la neologismo *Litvo* anstataŭ la ekzistanta vorto *Litovujo*, por emfazi la fakton ke Mickiewicz celis la historian landon, la Grandan Litovan Princlandon, parton de la iama Unio, kontraste kun la nuna Litovio (Privat 2007:19). Estis “simila al sano” ĝuste tiu lando, la multnacia kaj multlingva Litvo. Czesław Miłosz (1911–2004), simile kiel Zamenhof pensa heredanto de la tradicio de la Respubliko de la Du Nacioj, skribis en *Serĉado de la patrujo* jenon: “Ĉu oni povas imagi ties heroojn [tiujn de *Sinjoro Tadeo* — rimarkigo de la aŭtoroj] starigantajn al si la demandon pri sia naci-eco? La juĝisto Sopllica, kiu certe — kiel la tuta tiea bienposedantaro — interparolis kun kampanoj beloruse, eĉ ne ekhavis tiun ideon” (Miłosz 1996:128).

## La loko kaj la historia kadro de la vivo de L. Zamenhof

Zamenhof naskiĝas kiam la Pola Ŝtato ne ekzistas jam de pli ol du generacioj. En Parizo mortas Zygmunt Krasiński — la lasta el la grandaj romantikaj poetoj kunigataj en la mita skemo de la Triopo de la Naciaj Bardoj (angle: *the three national bards*<sup>7</sup>). Samtempe komenciĝas la antaŭantaj la januaran insurekcion eventoj de la t.n. morala revolucio, batalado *non-violence* kontraŭ la administrantaj Pollandon rusaj aneksintoj. Romantikismo, la plej grava epoko en la pola kulturo, estas ferminta sian kreaĵon de historion dek jarojn antaŭe. Daŭras la jardudeko transira inter romantikismo kaj pozitivismo, malpli riĉa je grandaj verkoj artaj kaj kulturaj, sed malproksima de stagnado. Kreaĵo maturecon atingas unu el la tri plej gravaj polaj poetoj ĉiutempaj, apud Mickiewicz kaj Kochanowski: Cyprian Kamil Norwid (1821–1883). La granda romantikismo, disvolviĝanta dum dudek jaroj en la elmigrejoj, ĉefe en Parizo, estas grandskale kaŝimportata al la lando, asimilata, transformata en kulturan kanonon kaj bazan tradicion. Poloj preparas sin al la sekva insurekcio, kiu finas la serion de la romantikaj politikaj revolucioj kaj indikas la transiran momenton inter du fazoj de la socia historio de la poloj. La juna generacio de poetoj kaj artistoj trovas en la januara insurekcio sian generacian travivaĵon kaj samtempe la lastan eblon revivigi la romantikajn kodojn de la kulturo. La plej bonaj inter ili, evitante la statuson de epigonoj, engaĝiĝas en la ŝanĝiĝojn en la pola kulturo sub la signo de pozitivismo (realismo en romanoj kaj moderigata, intelekta lirismo en poezio).

La kampanjo de la junaj pozitivistoj komenciĝas en la jaro 1871. Tiam ankaŭ reliefiĝas la dominanta historia rolo de la intelektularo. Tiu moderna, intelekta transformiĝinta pola elito celas civilizaciigon evoluon de la socio, socian emancipadon en la spirito de la organisma sociologio kaj plivastigon de la pola identeco, ĝis tiam limigita al la superaj sociaj tavoloj, al la malpli altaj sociaj grupoj: tiuj de laboristoj kaj kamparanoj (Łepkowski 1967). Krom la socia progreso de la popolo, krom emancipado de virinoj, la plej urĝa problemoj fariĝas egalrajtigo kaj asimilo de la juda minoritato, levita de publicistoj samkiel de beletristoj. En la beletro, inter la roluloj, aperas tuta galerio da judoj kiel pozitivaj herooj. Cetere, tio ne estas novaĵo en la pola literaturo. La modelon de pozitiva juda heroo ni trovas kaj ĉe Mickiewicz (Jankiel en *Sinjoro Tadeo*), kaj ĉe la populara prozisto kaj dramverkisto, Józef Korzeniowski (1797–1863): *Żydzi* (1843), *Kolokacja* (1847). Pozitivajn modelojn de judoj-patriotoj liveras *Okopy na Pradze* (1807) kaj *Pożegnanie czyli Marsz wojowników* (1808) de Ludwik Adam Dmuszewski (1777–1847) kaj *Wkroczenie do Litwy* (1812) de Fortunat Alojzy Gonzaga Żółkowski (1777–1822). Judoj mem kontribuas al la pola literaturo kiel pollingvaj verkistoj.

<sup>7</sup>La tri grandaj romantikaj poetoj: Adam Mickiewicz, Juliusz Słowacki (1809–1849), Zygmunt Krasiński (1812–1859).

Julian Klaczko (1825–1906), unu el la plej elstaraj polaj kritikistoj kaj eŭropaj artokonantoj, debutis per poezikolekto, verkita sub patroneco de Mickiewicz, en la lingvo ... hebrea. Henryk Merzbach (1836–1903), poeto, librovendisto, famiĝis en la historio de la pola poezio per kortuŝa poemo el la tempo de la t.n. morala revolucio antaŭanta la januaran insurekcion — *Do matki Izraelki* ‘Al la patrino israelanino’, 1861. Ĝi estis eĥo de la poemo de Adam Mickiewicz *Do matki Polki* ‘Al la patrino polino’, priploranta junajn polajn viktimojn, estintajn kaj estontajn.

### La socia rolo de *Sinjoro Tadeo* de Adam Mickiewicz en tiu tempo

Kiam oni parolas pri akceptado de la ideoj de *Sinjoro Tadeo* (1834) dum la pozitivisma epoko, indas pripensi kial ĝuste en la jaroj 1870-aj el la literatura tradicio de la pola romantikismo oni elektis tiun ĉi poezian verkon, kiu dum kvardek jaroj restadis en ombro, literaturaĵon nek entenantan ateston pri la nacia martirologio, kiel *Dziady* ‘Avoj’,<sup>8</sup> nek temantan pri la misio kaj alvokiteco de la nacio. *Sinjoro Tadeo* registras la provincan, trankvilan vivon de bienposedantoj en la biendomo de mezriĉa nobelo, en la malkvieta napoleona breĉo-epoko. Ekde 1872 oni skribas pri ĝi multe kaj favore; ekde la jaroj 1876–1878 aperas ĝiaj multnombraj reeldonoj. La motivoj de tiu revido — denove — fontas el la etoso de la pola intelektularo, kiu kunigas valorojn romantikismajn kaj pozitivismajn, naciajn kaj sociajn, partikularajn kaj universalaĵajn (tio estas la dominanta trajto de la pola kulturo, de romantikismo ĝis Solidarność).

Fariĝante ilo de la socia misio de tiu moderna elito, nur nun *Sinjoro Tadeo* komencis intense funkcii, laŭ sia terapia kaj demokratiga plano. La verko de Mickiewicz, en malmultekostaj eldonoj, iris ekster la ĝistiaman literaturan publikon kaj ĝi laŭvorte “migris sub tegmentojn”. Studadon de la edifaj bildoj de la komunuma vivo la pozitivisma revuaro, kun Piotr Chmielowski (1848–1904) kiel ĉefpledanto, rekomendadis al gimnazianoj kiel programeron en la reformita eduka sistemo. Tiam *Sinjoro Tadeo* unuafoje fariĝis objekto de scienca esplorado. Post 1872, ĝis la fino de la jarcento, aperis ĉirkaŭ 75 tekstoj pri ĝi. La pozitivistoj admiris la realismon de la verko, rigardante ĝian aŭtoron kiel romantikan antaŭanton de la literaturo kiun ili mem postulis. Ankaŭ la programo de pacienca, silenta, organismeca agado trovis komplikon en la rakontado pri Soplicowo,<sup>9</sup> kaj nepino de magnato, transformiĝinta en vilaĝan dommastrinon, personigis la pozitivismajn revojn pri demokrata Pollando. Laboro kiel ĝenerala devo, kaj libereco egaliganta ĉiujn grupojn de la

<sup>8</sup>Nomo de malnova slava popola kutimo, ligita kun kontaktoj kun mortintoj.

<sup>9</sup>“Soplicovo, tiu terangulo, ekzistanta sur neniuj landkartoj” laŭ la vortoj de Wanda Markowska en la antaŭparolo al la dua esperantlingva eldono de *Sinjoro Tadeo* (1986:IX).

nacio — jen ideaj faktoroj, kiuj ludis bazan rolon en la socia akceptado de la verko. En la jaroj 1905–1920, kiam Pollando alproksimiĝadis al reakiro de sendependeco, revenis partoj de la enhavo, emfazantaj la demokratan, por ne diri popolan, karakteron de la verko. Antoni Grabowski kun sia “Litvo! Patrujo mia!” bonege lokiĝas en tiu akcepto-fluo (la traduko estis finita en 1918).

El la hodiaŭa perspektivo ni vidas ankoraŭ pli. Soplicowo estas escepta loko, renkontiĝejo de hejmeco kaj fremdeco. Kvankam la nobelaro (cetere, restanta en bedaŭrindaj internaj konfliktoj) devas aktiviĝi en sanga batalo kontraŭ rusa taĉmento, fremduloj en *Sinjoro Tadeo* eĉ ne dum momento estas traktataj malame, ksenofobie aŭ demagogie. La du plej nigraj karakteroj de la poemego estas: anakronisma provinca nobelo kaj rusa oficiro estanta tamen renegato, rusigita polo. La negativa bildo de la lasta tamen ne rezultas el lia ŝanĝo de identeco, sed el la fakto ke tiu ŝanĝo baziĝis sur persona fiasco. Simpation por la rusa kulturo esprimas Telimena, damo malproksima de la idealo de polino-patriotino, sed en la poemego tute ne mallaŭdata. Rusoj mem aprecis *Sinjonon Tadeon*, kaj la tradukoj en la rusan trovadis pozitivan, se ne entuziasman eĥon en tiea gazetaro (vidu Cybienko 2006:307–321).

### La rolo de la verko por la pola kaj esperanta kulturoj

Ekde la intensa dumpozitivisma akceptado, *Sinjoro Tadeo* estas akirinta firman rangon de fonto de identigaj spertoj de poloj. En tiu historio, en kiu la eminenteco de la poezio de ĉiutaga kunestado ne cedas al tiu de la napoleona epopeo, la juna generacio, same kiel pli aĝaj legantoj, trovis simbolan universon de la pola kulturo, la belecon de ĝia tradicio, nedisigebla de la eŭropa civilizacio, la ĉarmon de la teritorio kaj la belecon de la naturo, vidata samtempe tra la romantikisma entuziasmo kaj folkloreca naiveco. Dank’ al tio, la sekvaj generacioj de legantoj povis migri laŭ la Soplicowo-vojo al “renovigado de la nacia identeco” (Dopart 1999:4). Soplicowo montriĝis kiel renkontiĝo-loko de diversaj epokoj, kiel mondo en kiu super ĉiaj dividoj gravas antaŭ ĉio la moralo kaj la sentemo de la persono.

*Sinjoro Tadeo*, tiu 19-jarcenta sintezo de la nacia vivo, poezia antropologio de la pola kulturo, enhavas profundajn tavolojn de la aparteco de la loko kaj tempo — kaj ĝuste tia poleco kaj tia verko fariĝis la vizitkarto de la pola kulturo internaciskale (pli ol 50 tradukaĵoj en 26 lingvoj; Zarębina 2006:298). Sian internacian akceptan sukceson *Sinjoro Tadeo* dankas al registro de la elementaj komunumaj spertoj de homo, epopea tuteco de la poezia spertaro, terapia lirismo kaj la ne spertata en la 19-a jarcento fenomeno de senpera ontologia evidenteco de simbola prezentado, la enteniĝanta en la poezia *mimesis* certeco ke la filozofiaj “disputoj pri la ekzisto de la mondo” (termino de Roman Ingarden) devas esti solvitaj favore al la objektiva estado.



En la tempo de Ludoviko Zamenhof tiu metafizika dimensio de la poemego de Mickiewicz estis malpli forte sentata. *Sinjoro Tadeo* estis ĝenerale konsiderata kiel mikrokosmo de la nacia kulturo, sed ĝi esprimis ankaŭ la spiriton de la pola romantikismo, spiriton kiu gajnis ĉiutempan daŭrecon, dank' al kio en la perspektivo de la tutaj 19-a kaj 20-a jarcentoj ĝi seninterrompe rememorigadis la humanecan, demokratecan kaj universalecan dimension de la naciaj aferoj. Dank' al *Sinjoro Tadeo* doktoro Esperanto povis kompreni polecon kiel neelĉerpeblan metaforon de la homaj kaj sociaj valoroj kiujn li mem volis servi.

Kiel loĝanto de la 19-jarcenta Varsovio, Zamenhof ne sentis fremdecon de la tendencoj dominantaj en la tiama pola socia kaj kultura vivo. Inter la intelektaj patronoj de la varsovia pozitivismo estis la speciale proksimaj al li eŭropaj filozofoj Auguste Comte (1798–1857) kaj Immanuel Kant (1727–1804).

Ankaŭ pro personaj cirkonstancoj doktoro Esperanto povis profiti de la spirito de toleremo kaj de la emancipa optimismo per kiuj penetrita estis la pensmaniero de la tiama pola elito. Kiel kuracisto L. Zamenhof prezentis unu el la personmodeloj, fervore rekomendataj de la polaj pozitivistoj — tiel li realigis en sia vivo la plenan gamon de la valoroj entenataj en la etoso de la pola intelektularo. En la plej granda kaj plej moderna pola urbo Zamenhof trovis medion favorantan evoluigadon de sia koncepto kaj idearo de la internacia lingvo.

## Bibliografio

- Cybienko, Helena. 2006. „Pan Tadeusz” Adama Mickiewicza w Rosji (przekłady, recepcja, paralele typologiczne) [“Sinjoro Tadeo” de Adam Mickiewicz en Rusio (tradukoj, akceptado, tipologiaj paralelaĵoj)]. **En:** Dopart (red., 2006).
- Dopart, Bogusław. 1999. Czem był „Pan Tadeusz” dla Polaków w dobie niewoli. [Kio “Sinjoro Tadeo” estis por poloj en la tempo de mallibero]. **En:** *W świecie „Pana Tadeusza” [En la mondo de “Sinjoro Tadeo”]*. Postparolo de Bogusław Dopart; redakta prilaboro Waclaw Walecki; en kunlaboro kun Agnieszka Walecka. Krakovo: Collegium Columbinum.
- Dopart, Bogusław (red.). 2006. „Pan Tadeusz” i jego dziedzictwo: recepcja [“Sinjoro Tadeo” kaj ties heredaĵo: akceptado]. Krakovo: Universitas.
- Электронная еврейская энциклопедия*. Trovebla ĉe [www.eleven.co.il](http://www.eleven.co.il) (kontrolita 2012-10-06).
- Enciklopedio de Esperanto*. 1979. Red. Kökény, L[ajos]; Bleier, V[ilmos]. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio. Represo de la unua eldono.
- Łepkowski, Tadeusz. 1967. *Polska — narodziny nowoczesnego narodu (1764–1870) [Pollando — naskiĝado de la moderna nacio (1764–1870)]*. Varsovio: Państwowe Wydawnictwo Naukowe.
- Maimon, N[aftali] T[svi]. 1978. *La kaŝita vivo de Zamenhof*. Tokio: Japana Esperanto-Instituto.

- Mickiewicz, Adam. 1986. *Sinjoro Tadeo*. Esperanta traduko de *Pan Tadeusz* fare de Antoni Grabowski. Serio Oriento–Okcidento 22. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio. (Unua eldono 1918.)
- Miłosz, Czesław. 1992. *Szukanie ojczyzny* [*Serĉado de la patrujo*]. Krakovo: Społeczny Instytut Wydawniczy Znak.
- Przybyła, Zbigniew. 2006. „Pan Tadeusz” w ocenie krytyki pozytywistycznej [“Sinjoro Tadeo” laŭ la pritakso de la pozitivismaj kritikoj]. **En:** Dopart (red., 2006).
- Privat, Edmond. 2007. *Vivo de Zamenhof*. Sesa eldono, redaktita de Ulrich Lins. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. Trovebla ĉe Projekt Gutenberg, [www.gutenberg.org](http://www.gutenberg.org) (kontrolita 2012-10-06).
- Snyder, Timothy D. 2006. *Rekonstrukcja narodów: Polska, Ukraina, Litwa, Białoruś 1569–1999*. [*Rekonstruo de la nacioj: Pollando, Ukrainio, Litovio kaj Belorusio 1569–1999*]. Traduko de Maria Pietrzak-Merta. Sejny: Fundacja Pogranicze.
- Wiśniewski, Tomasz. 1987. *Ludwik Zamenhof*. Enkonduko de Adam Dobroński. Bjalistoko: Krajowa Agencja Wydawnicza.
- Zagajewski, Adam. 2004. Wstęp [Enkonduko]. **En:** Czapska, Maria (2004), *Europa w rodzinie: Czas odmieniony* [*Eŭropo en familio: Tempo transformita*]. Krakovo: Znak.
- Zarębina, Maria. 2006. Przekłady „Pana Tadeusza” na języki zachodnie [Tradukoj de “Sinjoro Tadeo” al okcidentaj lingvoj]. **En:** Dopart (red., 2006).
- Ziółkowska, Maria. 1959. *Doktor Esperanto. Doktoro Esperanto*. (En la pola kaj esperanto; el la pola lingvo tradukis Isaj Dratwer). Varsovio: Wiedza Powszechna. 333 paĝoj + 16 paĝoj da ilustraĵoj.

#### *Pri la verkintoj*

La profesiaj okupoj de prof. d-ro habil. Bogusław Dopart koncernas la sferon de historio kaj estetiko de romantikismo, ankaŭ metodologion de esploroj pri tiu epoko.

Li estas estro de la Katedro de Historio de la Pola Literaturo de Klerismo kaj Romantikismo en la Fakultato de Pola Filologio de la Jagelona Universitato. Li kunlaboras ankaŭ kun la Kardinalo Stefan Wyszyński-Universitato en Varsovio, kie li estris la Katedron de la Literaturo de Romantikismo.

Li estas membro de la Literaturhistoria Komisiono de la Pola Akademio de la Sciencoj (PAN) kaj de la Pola Sociologia Societo, prezidanto de la Krakova Filio de la Literatura Societo portanta la nomon de Adam Mickiewicz kaj de la Krakova Komitato de la grava, ĉiujara konkurso por lernejanaj, nomata Olimpikoj pri la Polaj Literaturo kaj Lingvo.

Estas publikigitaj liaj 182 sciencaj verkoj el la kampoj de la polaj literaturo kaj kulturo, socia antropologio, filmscienco, laboraĵoj interfakaj.

Li estas aŭtoro de i.a. jenaj libroj:

- *Mickiewiczowski romantyzm przedlistopadowy* [*La antaŭnovembra romantikismo de Mickiewicz*] (1992);
- *Mickiewicza słowa sekretne* [*La sekretaj vortoj de Mickiewicz*] (1999);
- *Romantyzm polski: pluralizm prądów i synkretyzm dzieła* [*La pola romantikismo: plureco de la tendencoj kaj sinkretismo de la verkoj*] (1999).

Bogusław Dopart estas ankaŭ redaktoro de kolektivaj verkoj kaj kunkreinto de sinteza laboraĵo pri la romantikisma epoko, en *Historia literatury polskiej w dziesięciu tomach* [*Historio de la pola literaturo en dek volumoj*], volumo kvina: *Romantikismo* (2003, 2006, 2007).

---

Sabina Bobran estas doktoriĝontino en la Katedro de Historio de la Pola Literaturo de Klerismo kaj Romantikismo en la Fakultato de Pola Filologio de la Jagelona Universitato. Ŝi preparas tezon pri la poezia programo de la pola romantikisma poeto Cyprian Kamil Norwid. Ŝi verkis plurajn sciencajn artikolojn kaj prezentis referaĵojn dum konferencoj. En la sfero de ŝiaj esploroj troviĝas la literaturo de la pola romantikismo, ankaŭ la eŭropa literaturo, antropologio kaj sociologio de la kulturo de la 19-a jarcento.

*Paperpoŝtaj adresoj:*

Bogusław Dopart; Sabina Bobran,  
Wydział Polonistyki UJ, ul. Gołębia 16, PL-31-007 Kraków

*Retpoŝtaj adresoj:* [bjpdopart@wp.pl](mailto:bjpdopart@wp.pl); [sabina@seth.pl](mailto:sabina@seth.pl)

Ricevita 2011-05-17.

Reviziitaj versioj ricevitaj 2011-09-04, 2011-12-04 kaj 2012-09-16.

Akceptita por publikigo 2012-10-05